

KUL

V-29770/
1925

587

INTORMILO por Junaj Esperantistoj

Prezo:

1 leterafranko eksterlanden = 0,125 Sm.
= 0,25 germ. mk. = 0,06 us. dol.



Eldonis:

Esperantista Junularo, A. Neupert,
Leipzig - Möckern, Wedellstraße 17
(Germanujo)

Abonon de „Esperantista Junularo“

kaj aliĝon al Tutmonda Esperanto-Asocio
Junulara (T.E.A.J.) faru laŭ jena modelo:

Nomo:

Strato kaj kvartalo:

Loko kaj lando:

abonas po ekz. de „Esp. Jun.“ depost
la kvaronjaro 192... kaj sendas sam-
tempe la pagon.....

Mi aniĝas al „Tutmonda Esperanto-Asocio
Junulara“ kiel aktiva* — subtenanta*
— dumviva* membro* — delegito* (*nekon-
venan forstreku!) por

Jarabono de E. J. kun membreco al T.A.
E. J. kostas 8 afrankojn al letero alilanden
= 0.48 uson. dol. = 2 R.-Mk. = 2,50 sv. fr.
= 2 ŝil. = 10 fr. fr. = 16 ĉeh. kr. = 1 hin. dol.
Esperanto-grupoj abonas kvaronjare.

La abonilon sendu kun la mono en re-
komendita letero al la administracio de
E. J. kaj T. E. A. J.: A. Neupert, Leipzig-
Möckern, Wedellstr. 17, Germanujo.

Mendojn de ĉiuspecaj esperantaĵoj

(libroj, gazetoj, insignoj, kartoj ktp.) peras al T.E.A.J.-
anoj la administracio de T.E.A.J. kaj E.J.

Al informpetoj bonvolu almeti respondpagilon.

117.

*En la
junularo estas la estonteco!*

Jan Tichawski
Dziegielewo 109
paw. Glesya

Informilo
por Junaj
Esperantistoj



Eldonis:
Esperantista Junularo, A. Neupert,
Leipzig-Möckern, Wedellstraße 17
(Germanujo)



Antaŭnoto.

Sur plej eble malmultaj paĝoj ni celas respondi per la „Informilo“ ofte ricevitajn demandojn pri la esperantista junulara movado kaj pri esperantismo ĝenerale. La libreto estas senpaga aldono al „Esperantista Junularo“ por tiuj abonantoj, kiuj sendis al ni tutan jarkotizon. Interesuloj ricevas la „Informilon“, se ili antaŭpagas la samvaloron de unu eksterlanda leterafranko (1 poŝta respondkuponon).

Pluajn specialajn informojn pri la Esperanto-movado junulara donas al interesuloj

la eldonanto de

Esperantista Junularo.

Novembro 1925.



Jan Tichawski

Dzięgiełków 109

pow. Cieszyn

Tutmonda Esperanto- Asocio Junulara. (T.E.A.J.)

I. Regularo.

§ 1. Celo: Koncentrigo de junulaj kaj porjunulaj fortoj por

1. servi spirite kaj materiale al la Esperanto-junularo, ne diferencante pro raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

2. antaŭenigi la Esperanto - movadon inter la tutmonda junularo;

3. kreskigi inter ĝiaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon de ĉiuj popoloj. (Esperantismo.)

§ 2. Organizo:

1. Komitato, kiu konsistas el administranto kaj 6 komitatanoj, kiuj funkcias kiel reprezentantoj de la T.E.A.J.-anaro. Nur en tre gravaj aferoj oni voĉdonigas la tutan membraron. Centra Oficejo (C. O.) troviĝas ĉe la administranto de T.E.A.J.

2. Ĉefdelegitoj, kiuj administras T. E.A.J. en sia „Teritorio“. Ili restas konstante en kontakto kun la lokaj delegitoj antaŭ ol

tiuj estas subordigitaj sub distriktdelegitoj. Ili raportas fine de ĉiu kvaronjaro laŭ la oficiala formularo al la administracio la intertempajn ŝanĝojn kaj novaĵojn.

3. Distriktdelegitoj: gvidas la propagandon en sia „Distrikto“. Ili sendas laŭnecese raporton al la ĉefdelegito.

4. Lokaj delegitoj: Sur ili bazas la tuta asocio. Ili propagandas T.E.A.J. inter la loka junularo, sendas raporton al la distriktdelegito, abonas kaj disdonas la gazetojn por siaj grupanoj kaj helpas laŭpove ĉiujn esperantistojn ĉiurilate.

5. Ĉiu T.E.A.J.-ano estas parto de la tutmonda junularo-amikaro, kiu montru helpemon kaj honestecon al ĉiuj. Ĉiu ano donu respondon aŭ informon tuj kaj precize. Li estas devigata respondi tiam, kiam oni almetas respondpagilon. Se li tiukaze ne respondas, li la unuan fojon estas avertata de C.O., al kiu oni direktu ĉiujn ajn plendojn, la duan fojon, oni publikigas lian nomon en „Esperantista Junularo“, la trian fojon li estas eksigata el la asocio.

§ 3. Membreco: Membro de T.E.A.J. povas fariĝi ĉiu esperantisto, egale ĉu junulo aŭ ne. Oni diferencas inter membroj aktivaj kaj subtenantaj. Aktiva membro povas fariĝi nur junulo aŭ junulino, subtenanta membro ĉiu alia persono, kiu interesiĝas pri nia junulara movado. La rajtoj de ambaŭ membrospesoj estas la samaj. La aliĝon

povas rifuzi la loka delegito aŭ la plimulto de la loka grupo. Lokaj kaj distriktdelegitoj estas elektataj de la ĉefdelegito kaj tiu de C. O. En duboj decidas la plimulto de la komitatanoj. La komitato estas elektata ĉiun trian jaron. Ĝi voĉdonas pri honoraj membroj, kiuj havas ĉiujn rajtojn samkiel la aliaj membroj kaj estas liberaj je pago de kotizo. Dum vivaj membroj fariĝas tiuj, kiuj antaŭpagas la kotizon por 20 jaroj. Membrecio ĉesas pro nepago de kotizo ĝis la fino de Marto, pro libervola ekziĝo aŭ pro kontraŭregulara konduto. En la lasta kazo decidas la komitato laŭ propono de la tiea loka grupo aŭ distrikto.

§ 4. Kotizo: La jarkotizo por membro de T. E. A. J. estas enkalkulata en la jarabonon de „Esperantista Junularo“, 8 eksterlandaj leterafrankoj, minimume 0.48 us. dol. Ĉiu ĉefdelegito havas la rajton, plialtigi la oficialan jarkotizon je 15%, por pagi al si siajn elspezojn kaj tiujn de la distriktdelegitaj. La loka delegito ricevas, kondiĉe ke li havas pli ol 10 grupanojn, 10% de la kotizo. Grupoj de pli ol 10 anoj povas pagi kvaronjare la kotizojn.

§ 5. Gazeto: La gazeto, kiun ĉiu T. E. A. J.-ano ricevas senpage, estas „Esperantista Junularo“, kiu en ĉiu numero sub: „Oficialaj informoj de T. E. A. J.“ raportas pri ŝanĝoj inter la delegitaro kaj publikigas gra-

vafojn el nia movado. La lokaj delegitoj abonas la gazeton por siaj grupanoj rekte ĉe sia ĉefdelegito, kiu informas la administranton pri la novaliĝintoj. Nur post alveno de la pago la administracio de E. J. sendas la gazeton.

§ 6. Kunvenoj: Laŭ neceso kunvenas lokaj grupoj. Ĉiujare, eble dum pentekosto la ĉefdelegitoj okaze de la landaj kongresoj kunvokas la regnan anaron, kaj pritraktas tie ĉion, kio povas esti grava por T. E. A. J.-movado en la koncerna lando. Laŭnecese dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto okazas la ĝeneralaj kunvenoj de T. E. A. J. La komitato raportas pri sia laboro kaj la loka junulara grupo aranĝu jarfeston de la tutmonda esperantista junularo.

§ 7. Rilatoj kun aliaj asocioj: Tutmonda Esperanto Asocio Junulara estas sendependa junulara organizo. La komitato estas rajtigata intertrakti kun aliaj asocioj.

§ 8. Ŝanĝoj: La ĉefdelegitoj povas ŝanĝi partojn de la regularo laŭ siaj teritoriaj bezonoj post aprobo de la komitato. Ŝanĝi la regularon rajtas ĝenerala voĉdonado per 2/3 da voĉplimulto, sed la ŝanĝoj nur tiukaze oficialiĝas, se ilin aprobas poste la komitato.



II. El la historio de T. E. A. J.

Oktobro 1919: fondiĝo de grupo „Esperantista Junularo“ en Baugé (M.-et-L.), Francujo.

Estro: instruisto A. Robin.

Decembro 1919: „Esperantista Junularo“ interrilatas kun eksterlandaj esperantistoj.

Januaro 1920: la 1-a numero de la hektografita gazeto „Esperantista Junularo“ aperas.

Redaktoro: A. Robin.

Marto 1920: fondiĝo de U. E. A. J.

Januaro 1921: „E. J.“ estas presita du-paĝa gazeto. Aliĝo de Antverpenanoj (Fr. Schoofs).

Aliĝo de Liverpoolanoj (Th. Rawlinson).

Aliĝo de Asocio de Junaj Germanaj Esp.

Fino de 1921: „E. J.“ estas kvarpaĝa, 2-3 monata gazeto grandformata.

Oktobro 1922: „E. J.“ estas okpaĝa malgrandformata gazeto.

Aprilo 1923: aperas la 1-a jarlibro de U. E. A. J. (40 paĝa).

Majo 1923: „E. J.“ estas presata en Leipzig, prizorgata de A. Neupert.

Aŭgusto 1923: okazas la 1-a fakkunsido de U. E. A. J. dum Universala Kongreso en Nürnberg, aprobo de „Regularo de

U. E. A. J.", proponita de loka grupo Leipzig.

Januaro 1924: „E. J.“ estas presata en Baugé, Francujo, administracio de U. E. A. J. kaj E. J. restas en Leipzig.

Junio 1924: A. Neupert surprenas la eldonadon de „E. J.“ kaj novorganizon de „U. E. A. J.“.

S-o Pivl funkcias kiel prezidanto de U. E. A. J.

Aŭgusto 1924: Elekto de la unua komitato kaj aprobo de la regularo dum du kunsidoj de T. E. A. J. en Wien. Ŝanĝo de la nomo de la asocio je „Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara“.

Oktobro 1924: E. J. aperas sub redaktado de R. Pivl (Traŭtenau), administrado de A. Neupert (Leipzig) en la nova presejo Dro Karl Pickert (Leitmeritz).

Decembro 1924: Aperas „Kalendareto por Junaj Esperantistoj 1925“, eldonita de „Esperantista Junularo“.

Oktobro 1925: S-ro Pivl eksiĝas kiel prezidanto de T. E. A. J. kaj redaktoro de E. J. S-ro A. Neupert transprenas la redaktadon de E. J.

Prof. Dro. Dietterle akceptas la patronecon de T. E. A. J.

Kompletigo de la komitato de T. E. A. J.



III. Estraro de T. E. A. J.

Patrono: Prof. Dro. J. Dietterle (C. K.-ano)
Leipzig-Schleußig, Seumestr. 10. Germ.

Honora membro: A. Robin, Baugé, Fran-
cujo (fondinto de U. E. A. J.).

Administranto: A. Neupert, Leipzig-
Möckern, Wedellstr. 17. Germ. (Adreso
de la Centra Oficejo de T. E. A. J.
kaj Administrejo de „Esperantista Junu-
laro“).

Komitato:

1. Dro. Wm. S. Benson, 20, Mercer Str.,
Newark, N. J., Usono;
2. Serišev, B. O. Box 35, Novij-Gorod, Har-
bin, Manĝurio, Ĥinujo;
3. Georgo Steiner, Győr, Apatur utca 8,
Hungarujo;
4. Th. Rawlinson, 263, Thingwall Road, Wa-
wertree, Liverpool, Angl.
5. Aleks. Csáder, Bratislava, Zamočnická
ul. 8, Ĉeĥoslov.
6. Kurt Bujakowski, Breslaŭ 18, Gabitzstr.
166. Germ.

Vickomitatanoj:

1. Dim. Sneĵko, Poŝtkesto 33, Minsk, Sovet-
Unio.
2. Ŝen Min Chun, Nanyang, Middle School,
Lung-Hwa Road, Shanghai, Ĥinujo.

3. Alberto Trenkmann, Pirna a. E., Steinplatz 25. II. Germ.
4. Jaromir Rebiček, II. Hlavní nádr. 103, Olomouc, Ĉeĥoslov.,

Kontrolantoj:

1. Arno Achilles, Leipzig-Gohlis, Wiederitzscher Str. 17. II.
2. Karl Herrmann, Leipzig-Gohlis, Wiederitzscher Str. 2. E.
3. Carl Teumer, Leipzig-Gohlis, Roßlauer Str. 1.



IV. Ĉefdelegitoj kaj Reprezentantoj de T. E. A. J. en landoj:

Aŭstra: Alfred Klein, Schottenring 31/8, Wien I. (4744)

Belga: Willy de Schutter, Touwstr. 30, Antwerpen (2736)

Brita: Th. Rawlinson, 263, Thingwall Road, Wawertree, Liverpool (1)

Bulgara: Georgi Ĥristov Dimov, Dobrička 18, Varna (5375)

Ĉeĥoslovaka: Aleks. Csáder, Zamočnická ul. 8, Bratislava (1589)

Dana: Johannes Kjoer, Staalstr. 14, Odense (133)

- Estona:** Rudolf Grepp, Sönedä, P. E. Pöl-
lutöö, Keskkool (1507)
- Finna:** Esperanto-Instituto, Kluuvikatu 7,
Helsinki (4423)
- Franca:** Marcel Boubou, 96, rue St. Mar-
ceau, Orléans, Loiret (1670)
- Germana:** Curt Günthel, Dresden-Cotta,
Weidentalstr. 36, Poštĉeko Dresden 27537
(1000)
- Hispana:** Ferd. Montserrat, Barcelona, Vil-
larroel 107. 2 o. 2 a. 1905)
- Hungara:** Georgo Steiner, Györ, Apátúr-
utca 8 (1813)
- Irlanda:** F. R. A. Mc. Cormick, Mount Eden
Road, Donnybrook, Dublin (4742)
- Islanda:** Olavo Kristjansson, Kirkjuból Bjd.
Önundartjörður (2791)
- Itala:** Itala Esperantista Federacio, Rag.
Amerigo L. Reni, Via G. Mameli 2, Verona
(1879)
- Jugoslava:** Eugeno R. Römer, Novi Sad,
poštĉfako 166 (3984)
- Latva:** Belijav Radzins, Riga, Stabu iela
20 dz. 12 (1397)
- Litova:** H. Berkoviĉ, Kaunas, Rotušes
aikšte 15 (222)
- Nederlanda:** Evert de Wolf Jr., Haarlem,
Joh. de Breukstr. 34 (1838)
- Norvega:** Esperanto-Librejo „Agado“, Bok-
forlaget. Torvgaten 10. III. Oslo (1910)

Pola: Jan Pudiel, str. Sienna 76, l. 6, Warszawa (3982)

Portugala: Saldanha Carreira, Apartado 104, Lisboa (4637)

Rumana: Ernesto Schlesinger, cte Firmao Fuchs Nandor, Alba iulia (4062)

Rusa: 1. H. Frank, Gubkom, Esperantistov, 3aja Sovetskaja 21 kv. 25 (4639);
2. Dim. S. Snejko, Agentejo „Esperanto“, poŝtkesto n-o 33. Minsk (4419)

Sveda: Em. Söderlund, Stranden, Vejbysslatt (1292)

Egipta: C. M. Cather, P. O. B. 64, Port Said (3909)

Brazila: Antonio Borges da Silva, Travessa do Comercio 9 (4971)

Usona: Dro. Wm. S. Benson, 20, Mercer Str. Newark, N. J. (3901)

Orienta Azio: J. Serišev, P. O Box 35, Novij-Gorod, Harbin, Manĝurio, Ĥinuĵo (2666)

Ĥinuĵo: Ŝen Min Chun, Nanyang Middle School, Lung-Hwa Road, Shanghai (2632)

Japana: Shihodo kaj Ko., Esperanto-Librejo, 21 Higashi Takecho, Hongo, Tokio (1906)

Aŭstralia: Reginald F. Banham, Age Office Reading Room, Collins Street, Melbourne (4526)

Korea: Ikĝin Kim, (Chosen), Mokpo, N-o 46,
Bukkyo-Dong (2650)

Nederlanda Hinda: Kho Yok Siang,
Slompretan 25, Sourabaya, Java (1839)

Noto: La enkrampitaj numeroj montras la
membronumeron de T. E. A. J.



V. La plej grandaj lokaj grupoj de T. E. A. J.

(Urbo, lando, grupestro.)

Dresden-Cotta, Germ., Curt Günthel, Wei-
dentalstr. 36-II.

Leipzig-Reudnitz, Germ., Ilse Alex, Rathaus-
str. 42-III.

Recklingshausen, Rheinl., Germ., Vincenz
Albers, Steinstr. 18.

Potsdam, Germ., Max Heinrich, Sigismund-
str. 10.

Breslau 18, Germ., Kurt Bujakowski, Ga-
bitzstr. 166.

Neukölln, Germ., W. Wittbrodt, Rütlistr.
41, 31. Schule.

Freiburg, (Schlesien), Germ., Alfred Bräuer,
Waldenburgstr. 5-III.

Plauen i. V., Germ., Werner Koch, Schiller-
str. 17.

- Markranstädt-Gärnitz**, Germ., Erhardt
Mattschenz.
- Rostock**, Germ., R. Graetz, Waldemarstr. 17.
- Königstein** (Elbe), 143, Germ., Hans Erlbeck.
- Pirna a. E.**, Germ., Albert Trenkmann,
Steinplatz 25.
- Karlsruhe** (Baden), Germ., Karl Lamm,
Mondstr. 1-III.
- Liverpool**, Anglujo, Th. Rawlinson. 263,
Thingwall Road Wawertree.
- Odense**, Danujo, Johannes Kjoer, Staal-
str. 14.
- Kaunas**, Litov., H. Berkovič Rotušes aikšte 15
- Biržai**, Litov., Johano Kutra, Gimnazio,
Esperantista Sekcio.
- Wien I.**, Aŭstrio, Alfred Klein, Schotten-
ring 31/8.
- Peking**, Ĥinujo, Danereal Ŝ. Ĉ. Van, Pekina
Esperanto-Kolegio, West City, Monduan
Hutung.
- Shanghai**, Ĥinujo, Ŝen Min Chun, Nanyang
Middle School, Lung-Hwa Road.
- Mokpo**, Koreujo, Ikĝin Kim, N-046, Bukkyo-
Dong (Chosen).
- Harbin**, Ĥinujo, Manĝurio, J. Serišev, P. O.
Box 35, Novij-Gorod.
- Warszawa**, Polujo, Mieczystaw Gorecki,
Sosnowa 14
- Berezo**, Wolyn, Polujo, David Glizner.

Membraro de T. E. A. J.

en la 10 plej gravaj landoj

(laŭ la stato de la 25-a de Okt. 1925),

1. Germanujo	215 membroj
2. Ĉeĥoslovakujo	130 m.,
3. Bulgarujo	100 m.,
4. Britujo	70 m.,
5. Ĥinujo	68 m.,
6. Polujo	53 m.,
7. Hungarujo	45 m.,
8. Danujo	66 m.,
9. Francujo	36 m.,
10. Belgujo	35 m.
(aliaj landoj do entute ĉ.	300 m., 1100 membroj).



Esperantista Junularo.

1. **Fondinto** kaj redaktoro ĝis la komenco de 1924: A. Robin, instruisto en Baugé (M.-et-L.), Francujo.
2. **Administranto kaj redaktoro:** A. Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstr. 17, Germ.
3. **Redakciaj kunlaborantoj:**
 - A. Achilles**, Leipzig (Literaturo),
 - Prof. Dro. Göhl**, Neugersdorf (Por pliperfektigo),
 - N. Booth**, Netherton, Huddersfield, (por Skolta Esperantista Ligo),
 - H. Greff**, Elbing (por Mondjunulara Ligo),
 - K. Bujakowski**, Breslaŭ (por Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj),
 - Dro Wm. S. Benson**, Newark (por Benson School of Esperanto),
 - W. Krüger**, Leipzig (por Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj),
 - A. Klein**, Wien (por „La Naturamikoj“),
 - Dro. H. Grossmann**, Wandsbek-Hamburg (por Baha'i-Mondunuiĝo, germana teritorio).

4. **Pretigado.**

Redaktfino estas la 15-a de la antaŭa monato. Ekspeddato estas la 15-a de la apermonato.

5. **Abonkotizo** jare: inkluzive la sendkostojn estas ĝenerale 8 leterfrankoj al eksterlando, sed minimume 0,48 uson. dol. aŭ 2 germ. mk., 3,50 aŭstr. ŝ., 2 brit. ŝil., 16 ĉeĥ. kr., 2,40 dan. kr., 18 finn. mk., 3,20 hisp. pes., 36.000 hung. kr., 12 ital. lir., 1,20 jap. jen., 1,2 ned. guld., 30 jugosl. din., 1,80 sved. kr., 2,50 svis. fr., 10 fr. fr., 10 belg. fr., 2,50 poln. zl., 2,50 lat. lat., 64 bulg. lev., 2,50 norv. kr., 10 portug. esk., 5 lit. lid., 1 ĥin. dol., 1 Sm. por 12 numeroj.

Esperanto-grupoj kaj -klasoj povas aboni kvaronjare.

Landaj agentoj kaj la **estroj** de la aliĝintaj organizoj ricevas 25% de siaj enspezitaj abonpagoj, se ili dissendas la gazetojn en siaj teritorioj. Ili raportas laŭ oficiala formularo kaj pagas kvaronjare al la administracio. La ceteraj agentoj (lokaj delegitoj) kaj kursestroj povas reteni por si 10% el la enspezitaj abonpagoj, se ili abonas pli ol 1 ekzemplerojn.

La administracio de E. J. nur havas respondecon por tiuj elspezoj koncernantaj la gazeton, kiujn ĝi antaŭe skribe permesis. Ĝi nur liveras la gazeton kontraŭ antaŭpago de la abonanto.

6. Rilatoj inter E. J. kaj la aliĝintaj organizaĵoj.

W. J. L. (= Mondjunulara Ligo): Hermann Greff, Elbing, Hindenburgstr. 25, Germ.

S. E. L. (= Skolta Esperantista Ligo):

1. Norman Booth, Netherton, Huddersfield, Anglujo

5. Karoly Markovits, Elemér utca 17, Budapest VII, Hungarujo

A. J. G. E. (= Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj): Kurt Bujakowski, Breslau 18, Gabitzstr. 166, Germ.

T. A. G. E. (= Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj): W. Krüger, Leipzig-Kleinzschocher, Klingenstr. 31, Germ. Poŝtĉeko Leipzig 65553.

La Naturamikoj: Alfred Klein, Wien I, Schottenring 31/2.

Kosmopolit: H. Schröder, Leipzig-Gohlis, Johann-Georgstr. 24, Germ.

Benson School of Esperanto: Dro Wm. S. Benson, 20, Mercer Street, Newark, N. J., Usono.

Baha'i-Mondunuiĝo germana teritorio: Dro Hermann Großmann, Wandsbek-Hamburg, Schillerstr. 1.

Tiuj ĉi organizoj aliĝis al E. J. kaj uzas la gazeton kiel oficialon organon por siaj

junaj esperantistoj. Iliaj estroj
abonas la gazetojn rekte ĉe la adminis-
tracio de E. J. por ĉiuj abonemuloj. E. J.
disponas al la aliĝintaj organizoj apartan
rubrikon en ĉiu numero (por po 200
membroabonantoj ĉ. unu paĝon).



Esperantismo.

I. El la antaŭparolo de la Fundamento.

1. Pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo.

2 La fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla.

3. Ĝis la tempo, kiam aŭtoritata centra institucio decidus pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“ devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel r e k o m e n d a t a.



II. El la „Deklaracio pri Esperantismo“.

Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apar-

tenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo « Fundamento de Esperanto », en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.



III. Fundamenta Gramatiko de Esperanto.

(L. L. Zamenhof)

A. Alfabeto.

A a, B b, C c, Ĉ ĉ, D d, E e, F f, G g,
Ĝ ĝ, H h, Ĥ ĥ, I i, J j, Ĵ ĵ, K k, L l, M m,
N n, O o, P p, R r, S s, Ŝ ŝ, T t, U u, Ŭ ŭ,
V v, Z z.

R i m a r k o. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

B. Reguloj.

1. Artikolo nedefinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo definitiva (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rimarko. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

2. La substantivoj havas la finiĝon o. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon j. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo n. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per de, la dativo per al, la ablativo per per aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

3. La adjektivo finiĝas per a. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe substantivo. La komparativo estas farata per la vorto pli, la superlativo per plej; ĉe la komparativo oni uzas la prepozicion ol.

4. La numeraloj fundamentaj (ne estas deklinaciaj) estas: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil. La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj, Por la signado de la numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj — la su-

fikson obl, por la nombronaj — on, por la kolektaj — op, por la disdividaj — la vor-ton po. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj.

5. P r o n o m o j personaj: mi, vi, li, ŝi, ĝi (pri objekto aŭ besto), si, ni, vi, ili, oni; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivo.

6. La verbo ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon -as; la tempo estinta -is; la tempo estonta -os; la modo kondiĉa -us; la modo ordona -u; la modo sendifina -i. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta -ant; aktiva estinta -int; aktiva estonta ont; pasiva estanta -at; pasiva estinta -it; pasiva estonta -ot. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo est i kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio ĉe la pasivo estas de.

7. La a d v e r b o j finiĝas per e; gradoj de komparo kiel ĉe la adjektivoj.

8. Ĉiuj prepozicioj postulas la nominativon.

9. Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

10. La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

11. Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino): la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

12. Ĉe alia nea vorto, la vorto ne estas forlasata.

13. Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

14. Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon, sed se ni devas uzi alian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion je, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio je oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

15. La tiel nomataj vortoj fremdaj, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas plibone uzi sensanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

16. La fina vokalo de la substantivo

kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo.

Prefiksoj

bo (bopatro), dis (disiri), ek (ekkanti, ekkrii), ge (gepatroj), mal (malbona, mal-estimi), re (reveni, resendi).

Sufiksoj

aĉ (domaĉo), ad (pafado), aj (molaĵo), an (regnano), ar (arbaro), ebl (komparebla), ec (boneco, vireco), eg (pordego, petegi), ej (preĝejo, kuirejo), em (babilema), er (sablero), estr (ŝipestro), et (mureto, rideti), id (bovido, izraelido), ig (purigi, mortigi), iĝ (paliĝi, sidiĝi), il (tondilo, pafilo), in (patrino), ind (laŭdinda), ing (kandelingo, plumingo), ism (socialismo), ist (botisto, maristo), uj (pomujo, cigarujo, Turkujo), ul (belulo, maljunulo), um (aerumi, kalkanumo), ĉj (Miĉjo), nj (Manjo, Eminjo).



IV. El la historio de Esperanto.

1859. Zamenhof, Lazaro Ludoviko, nakiĝas en Bialystok (15. Decembro).

1878. Zamenhof festas kun siaj kunlernantoj la efektivigon de la „Lingvo Universala“.

1887. Apero de la broŝuro „Dro Esperanto, Lingvo Internacia“.
1889. Apero de la unua gazeto en E: „La Esperantisto“ en Nürnberg
1898. Fondo de la Societo por la Propagando de Esperanto en Francujo.
1901. Generalo Sebert prezentas Esperanton al la Franca Akademio de la sciencoj
1903. Fondo de „Juna Esperantisto“ de H. Hodler kaj Edm. Privat.
1903. Fondo de la Brita Esperantista Asocio.
1905. Unua kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer.
Akcepto de la deklaro pri Esperantismo.
Elekto de la Lingva Komitato. (L.K)
1906. Fondo de la Germana Esperanto Societo.
Dua kongreso de Esperanto en Genève.
1907. „Esperanto“, la oficiala gazeto de UEA reaperas sub gvidado de H. Hodler.
Tria kongreso de Esperanto en Cambridge.
1908. Oficiala fondo de UEA.
Kvara kongreso de Esperanto en Dresden.
1909. Kvina kongreso de Esperanto en Barcelona.
1910. Sesa kongreso de Esperanto en Washington.
1911. Sepa kongreso de Esperanto en Antwerpen (Anvers).
1912. Oka kongreso de Esperanto en Kraków.
1913. Naŭa kongreso de Esperanto en Bern.

1914. Deka kongreso de Esperanto en Paris.
1915. Dekunua kongreso de Esperanto en San Francisco.
1917. Morto de Dr^o L. L. Z a m e n h o f en Warszawa (14. Aprilo)
1919. Fondiĝo de la societo „Esperantista Junularo“ en Baugé.
1920. Morto de Hector H o d l e r, prezidanto de U E A
Fondiĝo de U E A J kaj E J.
Dekdua kongreso de Esperanto en Hago.
1921. Rezolucio de la Ruĝa Kruca instiganta la lernadon de Esperanto inter Ruĝkrucaj organizaĵoj.
Dektria kongreso de Esperanto en Praha
Rezolucio subtenita de 13 ŝtatoj ĉe la dua kunveno de la Ligo de Nacioj, favore de instruado de Esperanto en la lernejoj.
1922. Pedagogia konferenco pri Esperanto, kunvokita de la Instituto J. J. R o u s s e a u en Genève.
Dekkvara kongreso de Esperanto en Helsinki.
Decido de l'kongreso pri Oficiala Organizo Esperantista.
Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj; raporto de la sekretariaro de la L. d. N. al la tria kunveno.
1923. Komerca kaj turisma konferenco pri Esperanto en Venezia.
XV-a kongreso de Esperanto en Nürnberg.

1924. Konferenco pro enkonduko de Esperanto en la internacian Radio-trafikon, en Genève.
XVI-a kongreso de Esperanto en Wien.
Finorganizo de la Esperanto-movado.
La Ligo de nacioj rekomendas al siaj membroj permesi la uzadon de Esperanto kiel klaran lingvon en telegrafio.
1925. Konferenco pri Esperanto en industrio, komerco, scienco kaj radio en Paris.
XVII-a kongreso de Esperanto en Genève. Somera universitato.



V. La organizo de la Esperanto-movado.

1. Oficialaj Institucioj.

Internacia Centra Esperanto-Komitato. La I. C. K. konsistas el ses anoj, kiuj funkcias dum tri jaroj. Ili estas elektataj de la Konstanta Reprezentantaro kaj de U. E. A. kaj [zorgas] pri la ĝeneralaj interesoj de nia movado.

1. Dro Edm. Privat, prezidanto, Genève,
2. M. Rollet de l' Isle, por teknikaj fakoj, Paris,

3. Prof. Dro J. Dietterle, por instruado, literaturo kaj statistiko, Leipzig.
4. Rud. Hromada, por informado kaj gazetaro, Praha.
5. W. M. Page, por financoj, Edinburgh,
6. S-ino Isbrücker.

Konstanta Rezentantaro. (K.R.)
 Ĉiu nacia societo esperantista elektas po unu reprezentanton.

Honora prezidanto: Generalo H. Sebert. Prezidanto: John Merchant. Sekretario-kasisto: Ch. H. Edmonds, 21 Russelcroft Road, Welwyn Garden City, Angl.

Universala Esperanto-Asocio (UEA).
 Honora prezidanto: Ed. Stettler. Prezidanto: Dro Edm. Privat. Direktoro: Hans Jakob, 12 Bd. du Théâtre, Genève (Centra Oficejo de UEA).

Esperantista Lingva Komitato.
 La anoj de la L. K. estas elektataj de la Lingva Komitato mem por 9 jaroj laŭ listo starigata de la Akademio. Nuntempe la L. K. konsistas el 110 anoj.

Esperantista Akademio. Ĝi estas la supera komisiono de la Lingva Komitato.
 Prezidanto: Prof. Th. Cart. Vicprezidantoj: J. M. Warden kaj Dro Dietterle.

Direktoroj de Fakaj Sekcioj:

por Komuna Vortaro: Prof. Grosjean-Maupin,

por Gramatiko: Dro Lippmann,

por Elparolo: Dro. Privat.

2. Internaciaj Organizaĵoj.

Internacia Scienca Asocio Esperantista. D-ro O. Bujwid, prof. ĉe Universitato de Krakovo, Polujo.

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA). Dro Robin, Marszałkowska 113, Warszawa, Pol.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF). Ilija Puhalo, Jezuitska ul. 1, Zagreb, Jugosl.

Hebrea Esperanto-Asocio. Israel Lejzerowicz, Kilinskiego 28, Lodz, Pol.

Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt-kaj Telegraficistoj. Otto Reber, Kapuzinerstr. 33-0. Bamberg, Germ.

Internacia Asocio de la Esperantistoj - Stenografistoj. P. Flageul, 9, Boul. Voltaire, Issy-Seine, Franc.

Sennacieca Asocio Tutmonda. Colmstr. 1. III. Leipzig-Stötteritz, Germ.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). P. A. Schendeler, Prins Hendrikstraat 30. E. Eindhoven, Nederl.

Teozofia Esperanta Ligo. Chalet Bertha, Wilderswil, Svisl.

Natur-Viv-Societo: S-ino D. Hyams, 87 South Side, Clapham Common, London S W. 4.

Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj. Victor Hendricx, Rosendaalstr. 148, Vorst bij Brüssel, Belg.

Internacia Ligo de Liberpensuloj. Kurt Hubricht, Mariannenstr. 30. III. Leipzig-Neustadt, Germ.

Vegetara Ligo Esperantista. Oscar Bünemann, Alsterkrugchaussée 586, Hamburg-Fuhlsbüttel, Germ.

Esperantista Literatura Asocio. F-ino J. Zschepank, Dresden-A, Paul Gerhardt-Str. 22. Germ

Tutmonda Polica Ligo. A. H. de Marich, Budapest 18, Üllői ut. 59, Hung.

Internacia Radio - Asocio. Harry A. Epton, 17 Chatsworth Road, London E. 5.

Internacia Studenta Esperantista Asocio. Lidja Zamenhof, Krolewskastr. 41, Warszawa, Pol.

Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj. M. Goldberg, Leipzig-Co., Klemmstr. 14 p., Germ.

Konkordo: Ulica Dzika 9, loĝ 10. Warszawa, Pol.

3. Internaciaj Gazetoj.

Esperanto. 12, Boulevard du Théâtre, Genève, Svisl.

Heroldo de Esperanto. Horrem bei Köln, Germ.

Literatura Mondo. Eötvös utca 3, Budapest VI, Hung.

Sennaciulo. Sennacieca Revuo. Rich. Lerchner, Colmstr. 1. III., Leipzig-Stötteritz, Germ.

Libera Laborista. Artur Bolle, Berlin 58, Treschkowstr. 58, Germ.

Esperanta Ligilo (por Blinduloj). W. P. Merrick, Penso, Shepperton, Angl.

Vegetarano. Oscar Bünemann, Alsterkrugchaussée 586, Hamburg - Fuhlsbüttel, Germ.

Internacia Medicina Revuo. Dro Karlo Mezei, Teréz körút 6. III, Budapest 14, Hung.

La Policisto. A. de Marich, 255 Fiók-bériö (poŝtkesto), Budapest 41, Hung.

La Interligilo de l' P. T. T. Petro Filliâtre, 54 Rue Custine, Paris XVIII., Franc.

La Fervojoisto. Ilija Puhalo, Zagreb, Jezuitska ul. 1., Jugosl.

Espero Katolika. F-ino M. Larroche,
55 rue de Vaugirard, Paris 14., Franc.

Oomoto. Propaganda Oficejo, Kame-
oka, Kioto-fu, Japanujo.

La Unuigita Tuthomaro. W. Hey-
dorn, Tuthomaro, Hamburg 15, Germ.

Novaj Tempoĵ. M. Goldberg, Leipzig-
Connewitz, Klemmstr. 14 p., Germ.



Diversaĵoj.

I. Kelkaj ofte uzataj mallongigoj.

E., E-to	=	Esperanto,
s-ro	=	sinjoro,
s-ino	=	sinjorino,
f-lo	=	fraŭlo,
f-ino	=	fraŭlino,
s-ano	=	samideano,
s-anino	=	samideanino,
d-ro	=	doktoro,
k. c.	=	kaj ceteraj,
k. a.	=	kaj aliaj,
k. t. p.	=	kaj tiel plu,
t. e.	=	tio estas,
t. n.	=	tiel nomata(j),
F.	=	Fundamento,
O. R.	=	Oficiala Radikaro,
U. V.	=	Universala Vortaro,
O. A.	=	Oficiala Aldono.

II. Internacia monunuo „Spesmilo“.

Monunuo teoria kaj artefarita, uzata de esperantistoj, por plifaciligi la internaciajn monaferojn, estas

1 spesmilo (Sm.) = 100 spesdekoj (Sd.)
 1 spesmilo (Sm.) = 1000 spesoj (S.)
 1 spesdeko (Sd.) = 10 spesoj (S.)

1 spesmilo proksimume valoras al

2,5 svis fr.,	2 angl. ŝil.,
2 germ. mk.,	1 rus. rubl.,
1/2 us. dol.,	1 ĥin dol.
1,2 jap. jen.,	1,2 hol. flor.,
1,8 sved kr.,	2 dan. kr.,
2,5 norv. kr.,	12 ital. lir.
30 jug din.,	10 fr. fr.,
16 ĉeh. kr.,	70 bulg. lev. =

1 jarabono al E. J. inkluzive la membrecon al T. E. A. J., ĝenerale 8 leterofrankoj eksterlanden.

1 leterofranko eksterlanden =

1 poŝta respondkupono = 0,125 Sm. = 12,5 Sd. = 125 S = prezo de „Informilo por Junaj Espe antistoj“.



La ideala esperantistigilo!

Benson School of Esperanto
Inc., 20 Mercer Street, Newark,
N. J., USA, eldonas grandiozan
bildarverkon, intereseĝan kurson
da lecionoj, per kiu ĉiu persono
de iu ajn lando povas facile
ellerni la internacian lingvon
„Esperanto“ sen ia helpo aŭ
gvidado de instruanto.



Mendu po 4 lecionojn samtempe
sendante 1 us. dol. al la eldonejo
aŭ al iu rajtigita agento de B. S. E

Ĉefagentejo por Germanujo:

A. Neupert, Leipzig-Mö.
Wedellstr. 17.

Heroldo de Esperanto

Aperas dufoje en la semajno
Grandformata :: Ilustrita.

Petu senpagan specimenon de la
administracio!



La verkoj de Zamenhof

restas la plej legindaj por ĉiu
esperantisto:

Fundamento de Esperanto, kvinlingva	Rmk. 1.25
Fundamenta Krestomatio, 460 pĝ.	„ 2.75
Fabeloj de Andersen	„ 1.75
Proverbaro Esperanta	„ 1.75

La prezoj estas inkluzive afranko.
Petu nian novan Libro-Katalogon!

Heroldo de Esperanto,
Horrem bei Köln, Germanujo.

BENNEMANN:

Ia parto: Por komencantoj: kun Rm. 1.50. «La libro enhavas tek-

Ila parto: Por progresintoj: kun kun akompano de fortepiano.

„ . . . Mi kun granda intereso tralegis vian lego-
legado: mi gratulas vin pro tia verko per kiu vi multe
senco la libro estas perfekta. Ne sole la lingvo mem,

BENNEMANN: Internacia kan-

26 nacioj — kun aldono de 3 lamaj
Rm. — .60. Muzika eldono:

„ . . . Ili estas bonegaj kaj laŭ mia opinio eĉ
kaj de internacia vidpunkto tre interesa verko. »

EDMOND PRIVAT: Historio de la
co 1887—1900) Kartonita Rm. 1.60.

„ . . . Prave oni postulas en esperan-
la lingvo. Plej utila ĝi estas al ĉiuj,
dojn . . . nenio pli bone instruas ol

EDMOND PRIVAT: Vivo de Za-
Zamenhof. Kartonita Rm. 2.50,

Literatura Mondo (1923, Fe-
estas unu el la plej brilantaj gemoj de
fektecon jam garantios la nomo de la
verko. Ĉiu Esperantisto legu kaj sekvu

Originalaj Esperanto-Romanoj
naciaj literaturoj en « Inter

Bonvolu postuli senpagan transsend.

Rm. 1.— = sfr. 1.25. Poŝtmarkoj kaj

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-

TRA LA MONDO

multaj bildoj kaj muziknotoj, kartonita stojn el pli ol 20 lingvoj »

aldono de 4 komponaĵoj por unu voĉo

libron „Tra la Mondo“. Mi est s vere ravata pro la riĉigis la literaturon de nia Esperanta lingvo. En ĉiu sed ankaŭ la ilustrado kaj la enhavo.“

J. W. Sevenhuijsen, Haarlem.

taro. Kolekto de 64 popolaj kantoj el koncertarioj. Tekstaro: broŝurita: broŝurita: Rm. 2.—, bindita Rm. 3.—.

necesaj por Esperantujo. La kantaro estas tre originala
D-ro Leo Zamenhof.

lingvo Esperanto. Deveno kaj komen-

taj ekzamenoj konon pri la historio de kiuj devas gvidi kursojn aŭ fari parolahistorio.“

menhof. Kun portreto de D-ro L. L. Bindita Rm. 3.50.

bruaro): „... Legu ĉi tiun verkon, kiu nia originala literaturo; ĝian stilan per-aŭtoro. Li ne bezonas recenzon nek lia la majstron“.

kaj Modelaj tradukoj el ĉiuj nacia Mondliteraturo »

on de nia Literatura Informilo N-ro 2.

respondkuponoj ne estas akceptataj.

Fako, Leipzig, Salomonstraße 15.

MALKARA LITERATURO

estas necesa por la junularo
kaj ŝatata de ĝi. Tia literaturo
estas nia konata, ĉie rekomendata

==== **Esperanta** ====
Biblioteko Internacia

de kiu ĝis nun elvenis 33 numeroj.
Ĉiu numero (po 40-50 paĝ.) kostas
nur 0,40 R.-M.

Liston de la el-
venintaj numeroj vi trovas en nia

Esperanto - Katalogo,

kiun ni senpage sendas. Do pos-
tulu ĝin! La katalogo enhavas
ankaŭ multajn aliajn verkojn por
lernado de Esperanto kaj por
perfektiĝo en la lingvo.

Esperanto-Verlag

ELLERSIEK & BOREL

G. m. b. H.

Berlin SW 61, Wilmsstr. 5

Germanujo.

Junula grupo Pirna

serĉas rilatojn kun gejunuloj en tuta mondo. Adr.:

S-ro Alberto Trenkmann,
Pirna a. E., Steinplaco 25, Germ.

Poŝkalendareto por Junaj Esperantistoj 1 9 2 5

estas ankoraŭ havebla kontraŭ pago de unu leterafranko al eksterlando (inkluzive la sendkostoj) de la administracio de E. J.

ADA: REMEMOROJ DE ESPERANTISTO

Prezo: 1 svisa franko, 0,75 germ. mk.

Bonega legaĵo por Esp.-Junuloj.

Mendu ĉe la admin. de E.J.

Ĉu vi estas
membro de UEA?

Ĝi donas al vi
por via kotizo:

1. Oficialan Jarlibron de la Esperanto-Movado,
2. Monatan gazeton „Esperanto“.

Ĝi postulas de vi pojure:

por esti membro	5 sv. fr.
„ „ membro-abonanto	12,50 sv. fr.
„ „ membro-subtenanto	25 sv. fr.



Aliĝilon kaj pagon sendu al la loka delegito de UEA aŭ, se tia ne ekzistas, al:

Universala Esperanto Asocio

12 Boulevard du Théâtre,
Genève (Svislando)

Ĉiu
T.E.A.J.-ano

estas agento de

Benson
Skolo Esperanta
(Benson School of Esperanto)

varbante aĉetantojn de

„Universala
Esperantistigilo de
D-ro Benson“.



Ĉiu agento ricevas 25^{0/0}
da rabato.

**La junularo
volas kunlabori al la inter-
pacigo de la diversaj nacioj!**

Tial ĉiu junulo aliĝu al
**MONDJUNU-
LARA LIGO**

kaj instigu sian grupon
aŭ societon, ke ĝi aliĝu
korporacie. En multaj
landoj troviĝas
sekretariejoj.

Germanoj skribu al

**Georg Schulze-Moering,
Berlin SW 11, Möckernstr.
133. a. I. Germ.**

ORIENTO

100-paĝa gazeto esperanta, riĉega fonto por ekkoni la orienton kun ĝiaj sekretoj, bona propagandilo por ĉiu esperantisto kaj grupoj.

Abonu ĉe: „**ORIENTO**“
Ĥinuĵo, Mangŭurio, Novij-Gorod, P.O.Box 35,
Harbin, aŭ ĉe la administracio de E.J.

1 numero kostas 1/2 us. dol.

Agentejo

Esperanto

ĉe Blankrusa-Centra Oficejo de
Sovetlanda Esperantista Unio

MINSK, Poŝtkesto 33,
Administranto: Dim. Sneĵko,

Novaj Tempoj

Organo de Tutmonda Asocio de
Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE).

Specimenojn petu de

M. Goldberg,

Leipzig-Connewitz, Klemmstr. 14, p.

KOSMOPOLIT

Internacia Vojaĝ- kaj Sport-Ligo,
e.V., fondis apartan
Esperanto-Sekcion

Jarkotizo: $\frac{3}{4}$ uson. dolaro.

Oficejo:

LEIPZIG - GOHLIS

Johann-Georgstr. 24, p., German.

Internacia Mondliteraturo

La kolekto estas submetita al la gvidado de Prof. D-ro Joh Dietterle Ĝi enhavas nur la plej famajn verkojn el ĉiuj naciaj literaturoj Petukatalogon de Esperanto Fako de

Ferdinand Hirt & Sohn
Leipzig, Salomonstr. 15, Germ.

Kosmpolit. i. V.

Internacia Vojaĝ-kaj Sport-Ligo, Leipzig-Gohlis, Johann-Georgstr. 24.

preparas karavanon al XVIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Edinburgh (Aŭgusto 1926).

Esp.-Junuloj!

Uzu la okazon, sub favorkondiĉoj ĉeesti la venontan jarfeston de la esperantistaro.

ESPERANTISTA JUNULARO

**Helpilo por junaj Esperantistoj.
Ligilo por junulaj organizaĵoj.
Celo: Tutmonda junula amikaro.**

Organo de: **Tutmonda Esperanto-
Asocio Junulara, Skolta Esperan-
tista Ligo, Esperanto-Sekcio
de Mondjunulara Ligo, Baha'i-
Mondunuiĝo germana teritorio,
Bensona Skolo Esperanta.**

ABONPREZO ; kvaronjara por 3 numeroj la afranko
de 2 leteroj al eksterlando, minimume 0,12 usona
dolaro. Rabato por pli ol 10 ekzempleroj.

ANONCPREZO : po 1 kvadratacentimetro $\frac{1}{2}$ letera-
franko al eksterlando. Anonceto de 10 vortoj (krom
unu adreso) 2 leterafrankoj al eksterlando.

Redaktejo kaj administrejo:

**Alfred Neupert, Leipzig-Möckern,
Wedellstraße 17, Germanujo.**

Abonoj nur estas akceptataj, se ili
estas akompanataj de la abonpago!
Pagu per monbiletoj aŭ poŝtaj res-
pondkuponoj en rekomenditaj leteroj.

Germanoj uzu poŝtĉekan konton

Leipzig 7372.